„Mutig vorwärts!" „Kuraĝe antaŭen!"

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

6a jaro. No. 2 Monata Februaro 1929

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

arabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25, ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Ministerialrat Dr. Friedrich Rucker hält am 1. März im I. Wiener Esperanto-Klub, I., Annagasse 5 (Klubräume der Politischen Gesellschaft) um 1/28 Uhr seinen Vortrag »Die Entwicklung der Fremdenbeherbergung« mit Lichtbildern in deutscher Sprache. Einleitende Worte in Esperanto. Gäste willkommen.

Filmregisseur Dr. Ludwig Berger aus Hollywood (Kalifornien), der jetzt Europa bereist, äußerte sich in Wien einem Interviewer gegenüber wie folgt: „Ich glaube, daß der internationale Sprechfilm nur dann durchführbar sein wird, wenn seine Sprache Esperanto sein wird."

Esperanto-Unterricht in:

Darmstadt an der Volkshochschule;
Riesa von Ostern 1929 in allen Schulen, auch Realgymnasium und Handelsschule;
Huddersfield am Technical College, Queen St. South;
Helsinki am Normallyceum;
Salminen (Finnland) an der Volksschule;
Pécs (Ungarn) an der Realschule;
Kiamau b. Shanghai in d. Arbeiter-Hochschule als Pflichtfach, ebenso im Gymnasium in Putun (China);
Ludvika (Schweden) in der Mittelschule;
Rio de Janeiro am Handelslyceum als Pflichtfach;
Prag an den Blindeninstituten in Hradschany und Deyl als Pflichtfach;
Elsmere-Port bei Liverpool in der „Neuen Schule", die im Jänner 1929 eröffnet wurde, als Pflichtfach bei täglichem Unterricht mit 200 Knaben.

„Internacia Pedagogia Revuo", das offizielle Organ des Weltverbandes der Esperantolehrer in Leipzig, gibt bekannt, daß 1929 drei internationale Lehrerkongresse stattfinden werden, bei denen über Esperanto verhandelt, bezw. in Esperanto teilweise verhandelt werden wird, u. zw.:

Weltföderation der Erziehungsgesellschaften in Genf.

Intern. Föderation der Lehrervereinigungen in Genf.

Internat. Arbeitsrunde für Neue Erziehung in Helsingör.

Der **„Weltverband der Esperantolehrer"**-Leipzig hat Mitglieder in 33 Staaten.

Intern. Jugendkongresse 1928, bei denen Esperanto eine wichtige Rolle spielte:
Weltjugendfriedenskonferenz in Eerde (Holland), 17.—28. August;
Weltjugendlager am Chemin des Dames (Frankr.) 25. 7.—5. 8.; vom 6.—12. 8. in Chevreusetal;
Internationales Jugendlager in Sandwich (England), 3.—10. August;
Internationales Treffen der Weltjugendliga in Tilleleje (Dänem.), 22. 7.—5. 8.;
Jugendlager in Lille (Frankr.), ab 23. 7.;
Jugendlager in der Habsburg (Schweiz), 7.—10. 7.

Englische Aussprache.

Herr Adam aus Prag fuhr nach London und schrieb seinen Namen in das Hotelbuch ein. Sofort nannten ihn alle nach der englischen Aussprache "Edem". Darum schrieb Herr Adam auf seine Hotelzimmertür "Edem"; aber als man dies las, nannte man ihn "Idem". „Zum Teufel" sagte er und schrieb auf seine Tür "Idem"; nun nannte man ihn "Ajdem". Um nicht noch öfter seinen Namen wechseln zu müssen, kehrte Herr Adam zu seinem ursprünglichen Namen "Adam" zurück. In Esperanto wäre dieser Aussprachewirrwarr unmöglich, da jeder Buchstabe so ausgesprochen wird, wie man ihn schreibt.

Esperanto-Gottesdienst

Wien, I. Minoritenkirche
17. März, 10 h.

Prezidanto Miklas kaj Esperanto.

La numeroj »Esperanto« (januara), »Heroldo« (502) kaj »Aŭstria Esperantisto« (januara) estas transdonitaj al la prezidanto de nia respubliko. Ili ĉiuj enhavis artikolojn pri la prezidanto.

Universala Esp.-Asocio.

La komitato de UEA pro rezigno de d-ro E. Privat elektis E. Stettler, prezidanto de UEA. Dro Privat restas la redaktoro de la oficiala organo ‚Esperanto'.

Jubileo de d-ro Privat.

En decembro de l' pasinta jaro oni festis en Ĝenevo la 25 jaran jubileon de poresperanta agado de d-ro Privat, kiu antaŭ 25 jaroj fondis kun Hodler E.-societon kaj gazeton, kiam ambaŭ estis 14 jaraj.

Ni ne intencas nombri ĉi tie la unuopajn meritojn de la nuna »Honora Prezidanto de ICK«. Tiuj estas al ĉiu esp.-isto bone konataj. La historio ilin detale citos.

Ni petas pardonon, ke ni nur nun esprimas niajn respektplenajn kaj elkorajn gratulojn, sed tute senbrue oni festis la jubileon kaj ni nur nun sciiĝis pri ĝi el la gazetoj.

D-ro Privat dum multaj jaroj ankoraŭ agadu kaj verku por nia altideala ideo!

Por Aŭstria Esperanto-Asocio:
Hovorka, afergvid. Steiner, prez.

Ni gratulas al:

Generalo Sebert, fondinto de Centra Oficejo en Paris, eminenta kaj unu el la plej malnovaj pioniroj de nia movado en Francujo, membro de »Intern. Honora Komitato« de Intern. Esp.-Muzeo en Wien, kiu festis la 30. de januaro la datrevenon de sia 90-a naskiĝotago en plena bonfarto,

Marie Hankel, pionirino de E. depost 1905 kaj verkistino, kiu festis la 2-an de februaro sian 85-an naskiĝtagon.

E. en la bulgaraj poŝtoj.

La ĝenerala direkcio de poŝto kaj telegrafo rekomendas per cirkulero 13.325 de 3.12.28 al la poŝtoficistaro la uzadon de E. en telegrafio kaj telefonio kun la en-kaj eksterlando.

(Laŭ Heroldo.)

Internacia Esperanto-Muzeo.

Protektoro:

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio,
Wilhelm Miklas.

Leteradreso: Wien, I., Annag. 5.

Intern. Honora Komitato.

Afable eniris:

La prezidanto de ICK.

s-ro John Merchant, Sheffield, Anglujo,

S-ro prof. Väinö Voionmaa, Universitato, Helsinki (laŭ propono de Esp.-Asocio de Finnlando).

Intern. Kuratora Komitato.

S-ro fil. magistro Vilho Setälä, Helsinki (laŭ propono de Esp.-Asocio de Finnlando).

Materialo ricevita:

Laŭ donaclistoj n-roj 138. A. Babadagly — Odessa, 139. Latva E.-Societo — Riga, 140. R. Foltanek — Wien, 141. Förlagsföreningen E. — Stockholm, 142. Vatlajev — Melenki (U. S. S. R.), 143. Pola Esperantisto — Kraków, 144. Deutscher Esperanto-Bund — Berlin, 145. E.-Societo „Mano enMano" — Kameoka (Japanujo), 146. Espero Teozofia — Praha, 147. Esp. en Nipponlando — Tokio, 148. K. Knoll — Zittau, 149. J. Groebel — Koblenz, 150. E.-Verein — Potsdam, 151. José Anglada Prior — Barcelona, 152. Toma Ajolov — Plovdiv (Bulgarujo), 153. Benson School of E. — Newark (U. S. A.), 154. W. Kunnon — Dordrecht (Nederlando), 155. E.Relgis — Bucuresti, 156. H. Sentis — Grenoble, 157. Svenska E. Tidningen — Stockholm, 158. Il Podesta — Perugia, 159. Doktoro Banó — Budapest, 160. E.-Societo »Em. Peltier« — Graz, 161. Inĝ. Orengo — La Spezia, 162. Esp.-Grupo — La Spezia.

Mono alveninta:

E.-grupo en Potsdam donacis Ŝ. 16.83. Elkoran dankon!

Aliaj subtenantoj por 1929: D-ro E. Spielmann — Bern, Faderbauer — Obersulz, dir. Kraft — Wien.

Publikan dankon

ni eprimas al la Itala Landa Organizo kaj ties funkciuloj pro la modela organizado, kolektadi la italan materialon por IEMW. »L'Esperanto« multfoje alvokis al tio.

For Loka Kuratora Komitato:
Smital, sekr. Steiner, prez.

Internacia Konferenco por Turismo kaj Reklamo

30. de marto—2. de aprilo (Paskon) 1929 en Frankfurt a. M.

Laŭ invito de la Organiza Oficejo de la Urbo de Frankfurt a. M. kaj de la Internacia Foiro de Frankfurt a. M. okazos je Pasko 1929 la supre nomita konferenco.

Estas invititaj partopreni ĉiuj korporacioj de turismo kaj reklamo, vojaĝoficejoj, turismaj agentejoj kaj centroj, komercaj ĉambroj, industrisindikatoj, reklam-fakunuiĝoj, reklam entreprenoj ĉiuspecaj, samkiel la asocioj por komerca klerigado de la tuta mondo.

La konferenco estas kunvokita por akcelado kaj solvo de vico da problemoj en la sfero de l'turismo kaj reklamo. Ĝi ĉefe celas la starigon de novaj rilatoj en tiuj ĉi kampoj kaj de pli intima internacia kunlaboro en la spirito de l'servo al la publiko.

Tiusence ĝi okupos sin en paroladoj, raportoj kaj rezolucioj pri tiuj demandoj. Gravegaj korporacioj kaj fakuloj estas invititaj al tiu ĉi konferenco kaj parte jam promesis sian kunhelpon.

Frankfurt a. M. la malnova komerca metropolo ĉe la krucpunkto de l'eŭropa trafiko, kun altaj spiritaj interesoj kaj rilataro al en- kaj eksterlando, la urbo de l'plej malnova germana foiro estas kvazaŭ antaŭdestinita por aranĝo de tia konferenco.

Provizora programo

1) Problemoj de la Internacia Reklamo.

a) Psikologio kaj Valoro de Reklamo (Paroladoj).
b) Reklamo kaj Reklam-Lingvo (Paroladoj)
c) Spertoj pri la internacia helplingvo en la foira kaj turisma reklamo (Raportaro de interesitaj korporacioj).
ĉ) la reklam-scienco en la komerca klerigado (Starigo de kursoj, vojoj, metodoj ktp.) (Paroladoj kaj sugestoj).
d) Internaciaj jur-problemoj (Paroladoj).

2. Problemoj de l'Turismo kaj Trafiko.

a) Aer-veturado kaj turismo (Spertoj kaj proponoj).
b) Radio kaj Turismo. (La radio-stacio kiel helpanto de la turismo). Proponoj kaj sugestoj.
c) Demandoj de l'fervoja komunikado, de dogan- kaj lim-formalaĵoj. (Kritikoj kaj praktikaj proponoj.)
ĉ) Preparado de fremdul-gvidantoj, interpretistoj, tradukistoj, inform-oficistoj. (Proponoj kaj sugestoj).
d) Kolektiv-reklamo: Foiroj kaj Ekspozicioj kiel akcelantoj de la turisma kaj trafika reklamo. (Spertoj, sugestoj kaj proponoj).
e) La rekta kontakto de l'vojaĝanto kun lando kaj popolo kiel akcelilo de l'tutmonda paco. (Parolado).
f) Internacia leĝaro pri la sekurigo de l'fremdultrafiko. (Jura prelego, situacia raporto).

* * *

Paroladoj kaj raportoj en la konferenco estas allasataj en ĉiuj nacilingvoj **kaj en Esperanto.**

Traduko okazos nur en Esperanto.

Ni rememorigas, ke sinsekve la uzo de Esperanto eniris la plej div. sferojn. Ni povis registri ĝian uzadon en pluraj internaciaj institucioj kiel la Internacia Labor-Oficejo de la Ligo de Nacioj, la Instituto J. J. Rousseau kaj poste la Internacia Eduka Oficejo, la internaciaj foiroj k. a.

Okazis la Instruista Konfenco en Ĝenevo, poste la Komerca Konferenco en Venecio. Sekvis la Radio-konferenco en Parizo. Ĉiufoje gravaj korporacioj invitis al ilia partopreno kaj pli kaj pli grandiĝas la listo de la institucioj, kiuj senhezite rekonas la utilecon de Esperanto.

Sekvis poste la uzado de Esperanto kiel **traduka** lingvo en div. kongresoj. Sub la gvidado de la Internacia Eduka Oficejo estis organizita la Eduka Konferenco »Paco per Lernejo« en Praha 1927. Ĝi kunigis rondcifere 500 partoprenantojn kaj estis unika sukceso, multe atentita en la tuta mondo kaj precipe en Ameriko. En aŭgusto 1928 en Hago okazis la Interreligia Konferenco, kiu denove diskonigis la facilan uzeblecon de Esperanto en kongresoj, en kiuj oni parolas kaj laboras kaj ne balbutas kaj perdas la plej utilan tempon pro la teknikaj malhelpoj.

Ankaŭ vi, karaj samideanoj, estas kore invitataj al partopreno. Se vi mem estos malhelpataj, delegu anstataŭanton.

Por altiri vian intereson kaj por ebligi al vi la ĉeeston al tia grava kunveno, Germana Esperanto-Asocio kunvokis la 17. Germanan Esperanto-Kongreson samdate al Frankfurt a. M.

Estis interkonsentite kun la Prepara Komitato, ke ĉiu partoprenonto al la Konferenco estos samtempe rajtigata sen speciala kotizo partopreni ĉiujn aranĝojn de Germana Esperanto-Kongreso kaj ricevi ĉiujn koncernajn dokumentojn. La aliĝintoj al Germana Esperanto-Kongreso ĝuos la favoron pri samtempa partopreno en la Konferenco.

Kotizo sv. fr. 10·—

Vi samideanoj estas petataj pri jena helpo:

1) Sendu tuj adresojn de invitotaj institucioj de via lando, regiono aŭ urbo. (Invitoj estas dissendataj en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala kaj en Esperanto.)

2) Agu persone por atingi la delegon de reprezentanto, raportanto aŭ parolanto.

3) Klopodu eventuale mem fariĝi delegito, se vi povas iel esti utila al la koncerna institucio.

4) Atentigu fakulojn pri la aranĝo kaj invitu ilin partopreni en la paroladoj aŭ diskutoj.

5) Enskribu vin mem kiel paroladanto, se vi estas fakulo aŭ spertulo en iu el la fak-temoj. Vi povas paroli nacilingve kaj resumi en Esperanto aŭ plene paroli en Esperanto.

6) Fine aliĝu mem tuj kiel konferencano por helpi tian utilan demonstracion kaj sendu vian kotizon al la konferenca sekretariejo.

La definitiva tagordo estos ankoraŭ ĝustatempe konigata al la invititoj kaj partoprenontoj.

La Prepara Komitato plezure akceptos proponojn pri paroladoj kaj raportoj por enmeto en la kompletan programon.

Aliĝojn kaj demandojn direktu al la konferenca sekretariejo: S-ro Robert Kreuz, Hon. Agento de la Frankfurta Foiro, 12, Bd. du Théâtre, Genève, Svislando. — Kopiojn sendu al AEA, Wien, I. Annag. 5.

Vi ne ankoraŭ pagis vian kotizon por 1929. Afable sendu tuj S. 4.80 (ankaŭ en du partpagoj!) Nun vi ne plu povas malmendi la gazeton por 1929!

Al Ĝeneralradio de Finnlando.

La 12. II. Radio-Wien disaŭdigis bonegan paroladon de prof. d-ro Ludwig pri la belecoj kaj vidindaĵoj de Finnlando. Ni volente aŭdus pluajn tiel interesajn sciigojn. Ĉu Radiostacio Helsinki ne povus enprogramigi almenaŭ unufoje dum monato prelegon E.-lingvan, kiel tion praktikas Radio-Wien ĉiusemajne?

Ĉu la tramvojo en Wien servu al la fremdulfrekvento?

Antaŭ kelkaj tagoj mi veturis per linio 58 en Wien al Neuer Markt. Antaŭ la finstacio venis konduktoro al mi kaj diris en Esperanto, ĉar li vidis mian stelon: »Pardonu s-ro, mi devas turni la tabuleton«. Surprizite mi rigardis la konduktoron kaj demandis lin, kial li ne portas la stelon. Li respondis, ke tio ne estas permesata.

Ĉe la fervojo kaj polico la administraroj ekkonis la valoron de Esp. por la fremdulfrekvento kaj ordonis la portadon de la E.-insigno.

Ĉu la tramvojo en la fremdulurbo Wien ne ankaŭ estu helpema al la fremduloj?

Pli ol 100 tramvojistoj estas E.-scipovaj!

La direkcio uzu iliajn konojn en la intereso de la fremdulfrekvento! St.

Naciaj Radio-ĵurnaloj publikigas Esp.-Radio-Programon.

La plej konata radio-ĵurnalo »Der Deutsche Rundfunk«, same la grava amatora gazeto »Funk« jam kelkajn monatojn represas la Esp.-programon kaj lastatempe ankaŭ »Arbeiterfunk« publikigas ĝin. Nun ankaŭ la pola nacia radio-ĵurnalo regule volas publikigi ĉi tiun programon. »World-Radio«, la mondkonata angla ĵurnalo, nun aranĝas regule E.-angulon kaj intencas presigi la programon de la E.-disaŭdigoj. (Laŭ

raporto de J. Jungfer, membro de Komisiono por Radio-Statistiko.)

Ni esperu, ke nia granda kaj bela radio-gazeto »Radio-Wien« ne postrestu, sed baldaŭ sekvu la imitindajn ekzemplojn.

„Antaŭkongreso al la XXI-a" kun „Malfermo de Intern. Esperanto-Muzeo en Wien"

Wien, 29. VII. – 1. VIII. 1929.

Leteradreso: Wien, I. Annagasse 5.

Protektoro:

Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio Wilhelm Miklas.

Kotizo: Aŭ Ŝ. 7.– aŭ egalvaloro (vidu n-ro 1)

Kongreskarto alsendota en du semajnoj al la jam aliĝintoj.

Vizo: Vi nur montru ĉe iu limo de Aŭstrio vian **Wien-an** kongreskarton kaj vian enordan pasporton kaj vi povas senpage envojaĝi nian landon kaj post Budapest sammaniere ankaŭ senpage eniri denove Aŭstrion en la tempo de 15. de julio ĝis 15. de aŭgusto. Kurado al la konsulejo aŭstria en via lando superflua.

Rabato sur fervojoj: Ĉiu unuopa kongresano havas, montrante Wien-an kongreskarton, 25 % rabaton sur la aŭstriaj fervojoj de iu limo al Wien, kaj reveninte el Budapest, de Wien al iu limo de Aŭstrio.

Rabato sur ŝipoj de Donau-Dampfschiffahrtsgesellschaft: 50 % rabaton de Passau al Wien kaj de Wien al Budapest kaj reen. Ankaŭ de Giurgio al Budapest kaj Wien kaj reen. Necesa via Wien-a kongreskarto.

Rondvojaĝbiletoj: Rabatitaj rondvojaĝbiletoj estas eldonotaj. Ni proponas jenajn vojojn: 1) Wien trans Semmering al Graz (vizito de la urbo, akcepto ktp.) – Bruck – St. Michael – Selzthal – Steinach – Irdning – Bad Aussee – Bad Ischl – Salzburg aŭ de Steinach Irdning – Bischofshofen – Hallein (vizito al salminejo) – Salzburg (vizito de la urbo, akcepto ktp.) 2) De Wien al Linz (vizito de la urbo, akcepto, festo ktp.), de tie al iu limo. La prezojn ni publikigos en venonta numero.

Sen Wien-a kongreskarto neniu povos partopreni la aranĝojn en Wien kaj ĝui la rabatojn.

Gvidlibro tra Wien aperos en majo.

Gvidfolioj »Aŭstrio« kaj »Wien kaj Niederösterreich« ricevos ĉiu kongresano.

Blinduloj ricevos la kongreskarton senpage.

Antaŭpagota biletaro enhavos kuponojn antaŭpagotajn por la diversaj tag – kaj vespermanĝoj, noktiĝejoj, kafo sur Kahlenberg ktp. Detalojn kun prezoj en la venonta numero.

Karavanoj: UEA kaj Firmo Mosse aranĝos – ĉiujn elspezojn, ankaŭ kongreskotizojn por Wien kaj Budapest enkalkulitajn – oficialajn karavanojn.

Pri karavano de UEA informas aldono al »Esperanto« de januaro.

Pri karavanoj Mosse, kiuj veturos en du partoj, raportis Heroldo (n-ro 501). Informojn donas R. Mosse, Esperantofako, Berlin SW. 100

Kongresvalso, dediĉita al »Antaŭkongreso«, estis komponita de nia fervora samideano lernejesto Cipl en Zöbern (Aŭstrio).

Kongresmarŝo, dediĉita al la XXI-a en Budapest estis komponita de l'sama. Detaloj sekvos.

Aliĝis ĝis nun:

1. Steiner Hugo, ĉefinspektoro, Bisamberg
2. Schönrich Kurt, instr. Wiesbaden
3. Jakubowicz Israel, maklero, Antwerpen
4. Jungschaffer Hans, instr., Ried i. Innk.
5. Steiner Hugo, stud. arĥ. inĝ., Bisamberg
6. Steiner Lothar Fried., stud., Bisamberg
7. Hawlik Viktor, minist. kons., Wien
8. Macho Adolf, dir., Wien
9. Zwach Valerie, Wien
10. Smital Walter, Radio-Wien, Wien
11. Weber Gustav, instr., Wien
12. Dittrich Maria, instr., Wien
13. Sperling Igo, Wien
14. Drössler Otto, instr., Wien
15. Markus Eveline, priv., Wien
16. Bayhofer Anna, Wien

17. Ekström Erik, Göteborg, Svedujo
18. Luegmayer Karl, Korneuburg
19. D-ro Altrichter Matthias, Korneuburg
20. Einfeldt Rudolf, ofic., Korneuburg
21. Foltanek Rudolf, librovendisto, Wien
22. Peter Raimund, lern. kons., Bisamberg
23. Schauer Anton, frizisto, Klosterneuburg
24. Siedl Ludwig, magistr. ofic., Wien
25. Siedl Christine, Wien
26. D-ro G. Philippet, Paris (V)
27. Inĝ. Sinnek Emil, Wien
28. Wannek Karl, direkt., Linz
29. Van Gause Alice, Antwerpen
30. Van Gause Irma, Antwerpen
31. Geers Blanka, Antwerpen
32. d-ro E. Sós, Wien
33. Edmund Dittrich, fakinstr., Wien
34. Franz Braun, ĉefadmin., Wien
35. Jos. Faderbauer, lernejestro, Obersulz
36. Prof. d-ro Göhl, Neugersdorf, Saksujo
37. Antoni Troszyński, stud. theol., Peplin, Polujo
38. Leop. Cipl, lernejestro, Leopoldsdorf
39. Gaidosch Franz, Wien
40. Rambousek Jan, generalo, Ĉ. Budejovice
41. Tröger Margarete, Falkenstein i. Vogtl.
42. Kubillus Margarete, Königsberg i. Pr.
43. **Merchant John,** prez. de ICK., Sheffield
44. **Merchant Alice,** Sheffield, Anglujo
45. Wandl Fr., instr., Hainfeld

Respondoj al demandoj:

N-ro 37. Afiŝoj ne ekzistas. Jam nun dankon pro la promesita materialo por IEMW.

Por Prepara Komitato:

Hovorka sekr. Steiner prez.

•

Post Wien komuna veturado per ŝipo al

XXI-a en Budapest.

2.—9. aŭgusto 1929.

Kotizo Ŝ. 35·—. Anoncu vin tuj!
Adreso: Esperanto-Kongreso, Budapest.

Internacia ligo de Patrinoj kaj edukistinoj por la paco.

Al la Paco per la Amo.

Celo de la Ligo: Igi la Militon neebla forigante Malamon. La patrinoj aliĝantaj al la Ligo promesas enradikigi en la spiriton de siaj infanoj: La amon al la familio, al la patrujo, al la homaro.

La patrinoj devas eduki la infaneton ami ĉiujn membrojn de sia familio.

La patrinoj devas poste inspiri al la gejunuloj fratajn sentojn por ĉiuj homoj de sia gento kaj de sia lingvo.

La patrinoj devas fine konvinki ĉiujn ĉirkaŭ si pri la neceseco ami ĉiujn homojn el iu ajn nacio.

Ili tiel kunlaboros diskonigi tiun belan kondutmaksimon de Montesquieu:

»Se mi scius ion por mi utilan kaj malutilan por mia familio, mi ĝin forĵetus el mia spirito.«

»Se mi scius ion utilan por mia familio kaj malutilan por mia patrujo, mi penus ĝin forgesi.«

»Se mi scius ion utilan por mia patrujo kaj malutilan por Eŭropo kaj la homaro, mi ĝin rigardus kiel krimon.«

Fine, la patrinoj, per sia ĉiutaga ekzemplo, devas pruvi, ke la amo, sin montranta per oferoj konsentitaj al la konkordo kaj la paco, povas sola venki la egoismon, fonton de ĉiuj malpacoj kaj doloroj de ili naskitaj.

Sekretariino por Fremdlando: Sino H. Kriegk, 38 rue Laharpe, Le Bouscat-Bordeaux (Franclando).

•

Amuza vespero

kun artistaj prezentadoj en Unua Esperanto Unuiĝo la 8. de februaro 1929.

Jam la anoncita programo de ĉi tiu amuza vespero estis multon promesanta, sed ĝi tamen eĉ superis la altstreĉitajn atendojn. La aranĝon de la programo prenis sur sin s-ro registara konsilanto Viktor Pattera. La serion de la prezentadoj komencis fortepianistino Thea Vanda, ludante verve kaj profundsente hungarajn dancojn de Alfred Grünfeld. La artistino estis laŭte aklamita. Ŝin sekvis la honora membro de »Deutsches Volkstheater« Theodor Weiss, kiu ĉerpante el la granda provizo de sia repertuaro, deklamis seriozajn kaj humorplenajn poemojn. Pro laŭta aklamo li devis eĉ aldoni kelkajn.

Poste koncertmajstro ekskolonelo Rudolf Gallent violonludis »Malnovaj majstroj» de Burmester kaj «La cigno« de Saint Saens, ensorĉante per sia majstreca kaj varma muzikeco ĉies koron.

Koncertkantisto Anton Tausche kantis en Esperanto de Schubert »La tiliarbo« kaj »La korniko« (trad.

Sós) kaj de Richard Strauß »Revo tra krepusko« (trad. J. Schröder). La majstra, simpatia voĉo de l' ŝatata kantisto kaj lia distinga, dolĉevarma kantado vekis bruan aplaŭdon, kiun li rekompencis per aldono de ĉarma malnovgermana kanto.

Sinjorino Margit Hardegg, eksmembro de »Riddersaal«-teatro en Kopenhago kantis »Blankaj rozoj« de K. May, kun teksto de Aleksander Vallas kaj Wien-an popolkanton de Ralph Benatzky. La ĉarmo de la artistino, ŝia bela voĉo kaj bonega animplena interpretado entuziasmigis la aŭskultantojn kaj elvokis same laŭtan aplaŭdon.

La ĉefa belegaĵo de la vespero estis la kantado de operakantistino Annie Michalsky, la juna »Star« de la Wien-a operejo. Ŝi kantis »Frühlingssehnsucht« (printempa sopiro) de Schubert »Zueignung« (sindediĉo) de R. Strauß kaj la grandan arion el »Butterfly« de Puccini. Ŝia admirinda belkanto, distinge klara kaj ĉasteca soprano, per kiu ŝi tuj profunde impresis la aŭskultantojn, meritis preskaŭ neĉesantan aplaŭdon al la eminenta kantistino, kiu cetere estas fidela esperantistino.

La ŝatata Radio-artistino Adelheid Bergmann akiris ankaŭ riĉan aplaŭdon per ĉarmaj, kun distingo prezentataj kantoj al liuto. Ŝia nobla, delikata prezentadmaniero kaj ŝia perfektarta sinakompano havigis grandan ĝuon.

Bonan humoron venigis en la programon deklamoj de l' konata dialektverkisto Franz Zehden el siaj propraj verkoj. Liaj vilaĝanaj kaj lernejaj humoreskoj elvokis laŭtan gajecon kaj devigis la deklamanton al daŭrigo.

La konferencistan parton de la vespero prizorgis Aleksander Vallas, kaj ĉi tiu famekonata artisto donis al la tuta programo sian individuan karakteron. Liaj perigaj vortoj inter la unuopaj programpartoj estis modelaj, ravigaj humoraĵoj. Preskaŭ ne elĉerpeblaj estis liaj brilaj ideoj kun eminenta sprito kaj humoro spicitaj kaj instigis la aŭskultantojn al gajega ridado.

Fine sin prezentis Aleksander Vallas kiel perfekta recitatoro de propraj verkoj kaj devis pro granda aklamo ree kaj ree ion aldoni.

La alproksimiĝinta noktmeza horo devigis, pli frue ol dezirate al finigo de ĉi tiu treege bonsukcesinta amuza vespero.

Prezidanto Steiner dankis en sia malferma parolado al ĉiuj, kiuj faris ĉi tiun vesperon tiel ĝuoplena, kaj speciale al la klubmembro minist. kons. Viktor Hawlik, kiu sukcesis gajni reg. kons. Pattera kaj aron de la ŝatataj artistoj por la amuza vespero, al reg. kons. Pattera, al la kunagantaj artistoj kaj al d-ro Emil Kuhn kaj A. Tausche (filo), kiuj afable akceptis la muzikan akompanadon, ne nur pro iliaj eminentaj prezentadoj, sed ankaŭ por ilia malegoista sindisponigo al la unuiĝo.

La bonegan fortepianon afable kaj senpage disponigis la firmo Pfeiffer-Leippert, Wien., VII., Mariahilferstr. 35.

Malgraŭ la frosta vetero estis la vizito tre kontentiga kaj pruvis denove la ŝatatecon kaj reputacion de »Unua Esperanto Unuiĝo« en la publiko.

Gravaĵoj.

„Volkssport", novaperinta gazeto de laboristaj sportuloj ĉiusemajne publikigas E.-angulon. ASKÖ oficiale rekomendas al siaj membroj la skriban kurson de Aŭstria Laborista Ligo E.-ista. Parlamentano d-ro Deutsch, prez. de Laborista Sportorganizaĵo Internacia, kaj s-ro Gastgeb, sekr. de ASKÖ., jam partoprenas la supre cititan kurson.

»Heroldo de Esperanto« en sia lasta n-ro 502 preskaŭ la tutan unuan paĝon dediĉis al la aŭstria movado.

Österreichisches Verkehrsbüro (Aŭstria Trafikoficejo), Wien, I., Friedrichstraße 1 ĉijare la unuan fojon aldonas ankaŭ E.-tekston al sia ĝis nun nur en tri lingvoj (germana, franca kaj angla) aperinta prospekto pri la aŭtaŭpagotaj biletaroj »Kvar tagoj en Wien.« Ĉi tiu entrepeno jam

lastjare subtenis nian movadon, dissendinte je siaj kostoj la belegan gvidilon, »Tra Aŭstrio«, eldonita de Ministerio pro Komerco kaj Trafiko. Uzu vi samideanoj ĝiajn servojn, filioj en multaj urboj de l'mondo.

Paneŭropa-Unio, Wien, I., Hofburg. Ĝis fino de februaro vi ankoraŭ havos la eblecon antaŭmendi je favora prezo de Ŝ 4·— la fundamentan verkon »Paneŭropo« de R. N. Coudenhove-Kalergi, kiun tradukis nia pioniro d-ro Sós. Vi pagos la prezon, kiam la presigo de la libro estos garantiata. Kiu intencas aliĝi al E.-sekcio de Paneŭropa-Unio skribu al la supra adreso. Jarkotizo Ŝ. 3.—.

Aŭstria Esperanto-Asocio

Wien, I., Annagasse 5

Al ĉiuj grupoj kaj izoluloj en Aŭstrio!

La 4-an de februaro okazis kunsido de la estraro kaj konsilantaro de Aŭstria Esperanto-Asocio, por starigi la principojn, laŭ kiuj estu plenumotaj la plej proksimaj devoj de ĉi tiu laŭleĝa landa organizaĵo de la aŭstria esperantistaro, internacie rekonita.

La plej granda malfaciligo, malhelpo, malfeliĉo, ja certe kaj vere granda danĝero por nia movado en Aŭstrio, kia ajn ĝi estu kaj kien ajn ĝi celu, estas la malkonkordo, diseco, apartemo, kiun oni devas ĉagrenite kaj pezkore konstati inter la aŭstriaj esperantistoj.

Tial la unua kaj ĉefa tasko de Aŭstria Esperanto-Asocio estu, pacigi la atmosferon, akordigi la spiritojn, unuigi la malnovajn, meritplenajn pionirojn, utiligi la entuziasmon de la novaj. Pro pieco kaj ama respekto al Zamenhof, kies lingvon ni ja uzas, ni plenumu la testamenton de nia kara Majstro kaj fariĝu unu granda ronda familio antaŭ ĉio en nia propra ŝtato, por ke ni povu purkore plenumi niajn pli grandajn devojn internaciajn. Ĉi tiu paciĝo estos serioza provo por ni ĉiuj.

En ĉi tiu senco Aŭstria Esperanto-Asocio, sur kiu ne pezas rememoroj pri iamaj malfacilaĵoj kaj bataladoj, nepre ne diskutos pri personaj malkonsentoj. Tiaj ne koncernas oficialan institucion. Organo de Aŭstria Esperanto-Asocio estos „Aŭstria Esperantisto", por kies oficiala parto estos respondeca la tuta estraro. Aŭstria Esperanto-Asocio rekonas kaj salutas samideane ĉiujn esperantistajn grupojn en Aŭstrio.

AEA invitas ĉiujn al samideana kunlaboro. Estas ja grandaj internaciaj devoj plenumotaj: Antaŭkongreso en Wien, Malfermo de Internacia Esperanto Muzeo, komuna veturo al Budapest ktp. Vizitos nin la internacia gvidantaro esperantista, kiu sin jam anoncis, vizitos nin granda internacia publiko ĉiuloke akceptota, gastigota. Ni aŭstriaj esperantistoj devos montri al ĉiuj karaj alilandaj samideanoj kaj ĉefe al la aŭstria neesperantista publiko, ke ni bone plenumas nian devon.

La aranĝoj okazos sub la oficiala respondeco de Aŭstria Esperanto-Asocio. Sed de ni esperantistoj unuopaj dependas bela sukceso. Tial ni petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne aniĝis al AEA: Kunlaboru por niaj komunaj celoj laŭ viaj eblecoj. Ni informos vin ĉiujn *pri ĉio, kio komuninteresa* okazos kaj invitos vin al ĉiuj komunaj aranĝoj!

Sed al tiuj unuiĝoj, societoj, rondoj, personoj, kiuj ne aparte staras heziteme kaj reteneme, sed kiuj entuziasme kaj ardkore nin subtenas en la plenumo de la devoj de la tuta aŭstria esperantistaro kaj kies fortoj estas nia forto, ni promesas samideanan amon kaj senkondiĉan sindonon al niaj komunaj, altaj, belegaj celoj.

Ni sincere, fratame kaj celkonscie kunlaboru por la sukceso de nia sankta afero! Tiam ankaŭ aniĝos la aliaj.

Kunlaboru je instalo de bone funkcianta gazetservo por Wien kaj la liglandoj, enkonduko de E. en la lernejojn diversspecajn kaj komercistajn rondojn.

Sendu al ni viajn proponojn!

AEA ricevis jenajn leterojn:

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (21. I. 29): Ni ĝojas pri la fondo de definitiva landa asocio en via lando kaj esperas, ke la nova organizaĵo sukcese laboros por nia komuna afero. Ni ankaŭ esperas, ke post nelonge ĉiuj samideanoj de Aŭstrio kuniĝos en tiu ĉi organizaĵo kaj ke post stariĝo de firma kaj laŭleĝa bazo, malfacilaĵoj estonte estos evitataj. Ni informas samtempe la sekretarion de KR kaj supozas, ke vi jam informis lin rekte pri la farita ŝanĝo.

John Merchant, prezidanto de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado (26. I. 29.): „Mi bedaŭras, ke en Aŭstrujo okazis interna konflikto sed esperas, ke la fondo de tute nova nacia asocio havos la plej grandan sukceson kaj al ĉiuj oficistoj mi sendas miajn plej korajn kaj sincerajn bondezirojn por tutplena triumfo super ĉiuj malfacilaĵoj. Forgesinte ĉiujn personajn ĉagrenojn kaj kun amo de Esperanto en la koroj, iru antaŭen kun kuraĝo kaj entuziasmo."

Nikolao Hovorka m. p.	D-ro Edmund Sós m. p.	Ĉefinspektoro Hugo Steiner m. p.
afergvidanto	vicprezidanto	prezidanto

Atentigo!

Estas dissendataj cirkuleroj kaj invitoj de Aŭstria Esperanto-Delegitaro (AED). Ni konstatas, ke nia landa organizaĵo **Aŭstria Esperanto-Asocio (AEA)** havas nenion komunan kun AED. **Atentu nian adreson!**

Oni demandis nin, kial s-ro Bernfeld, teritoria delegito de UEA., estas konsilanto de AEA., Kompreneble li ne estis elektita kiel reprezentanto de UEA. — tio ankaŭ ne estus ebla —! Sed kial lin ne elekti, se li intencas kaj kapablas kunlabori?

Alvoko!

1. Kiu ne ankoraŭ aliĝis, tuj faru tion (koncernas ankaŭ izolulojn),
2. La grupoj en la unuopaj federaj landoj nomigu siajn konsilantojn por AEA.,
3. Sendu proponojn.

Vizito a la grupoj.

Prez. de AEA vizitis la 25.—27. januaro la grupojn Linz, Salzburg, Hallein, Saalfelden kaj Innsbruck kaj faris al ili detalan raporton.

Por niaj fratoj en Bulgarujo.

Sub ĉi tiu titolo AE. kolektis Ŝ 42·— kaj sendis ilin al la Ministerio por Interno en Sofio. Ni ricevis nun jenan E.-lingve skribitan leteron:

»..... Kun danko ni konfirmas la ricevon de la monhelpo, sendita per vi de la aŭstriaj esperantistoj por la suferintoj de la tertremo.

Similaj homamaj gestoj estas elmontro de la internacia solidareco kaj reciprokeco — la solida garantio de la monda paco — kaj ni alte ŝatante la sentojn, kiuj instigis la esperantistojn en via lando sendi sian helpon, petas vin transdoni al ili nome sinceran dankon. Almetite ni sendas kvitancon N 557.

Kun estimo: La direktoro.

Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo.

Ni sendis salutleteron al la ĝeneralkunveno de la Ligo kaj ricevis jenan respondon:

An den Österr. Esperantobund, Wien.

Sehr geehrter Herr Oberinspektor!

Die Bundeshauptversammlung beauftragte mich, Ihnen, sehr geehrter Herr Präsident, den besten Dank für die übermittelten Grüße der AEA. auszusprechen und Sie zu bitten, die Versicherung entgegennehmen zu wollen, daß wir stets mit größtem Interesse Ihre Erfolge in Österreich verfolgen. Wir beglückwünschen Sie dazu und hoffen, daß es Ihnen auch in der Zukunft, Dank Ihrer Erfahrungen, gelingen möge, erfolgreich in offiziellen Kreisen zu werben. Ihre Erfolge haben nicht bloß örtlichen Wert, sondern Weltwert, da in anderen Ländern darauf hingewiesen werden kann, was in Österreich schon erreicht wurde ....

Mit freundlichen Grüßen Ihr ergebenster

Ing. Scholze m. p.

Esperantoprelegoj el Radio-Wien.

Ni ricevis jenan leteron:

Herrn Oberinspektor Steiner, Vorsitzender des Österr. Esperanto-Bundes

Wien.

Sehr verehrter Herr Oberinspektor!

Herr Smital wurde soeben bei uns vorstellig wegen des Umstandes, daß in dieser und der nächsten Woche der Esperantokurs statt um 18·45 h im Programm um 18·15 h angesetzt wurde.

Wir müssen feststellen, daß es sich dabei um ein bedauerliches Versehen unsererseits handelte und dem Esperantokurs die vereinbarte Vortragszeit 18·45 h reserviert bleibt, natürlich mit Ausnahme jener Fälle, wo der vorzeitige Beginn einer Übertragung eine Programmumstellung notwendig macht . . . .

Mit vorzüglichster Hochachtung

Österr. Radioverkehrs-A. G.

Honorigo.

I. Esperanto-Unuiĝo en Wien en sia ĝeneralkunveno elektis unuanime

s-ron magistron Alexander Taussig

Honora Membro.

P. d-ro Franz Christanell jubileas.

Nia meritplena, altŝatata malnova pioniro P. d-ro Franz Christanell, profesoro en Borromeum en Parsch-Salzburg, festis en januaro ĉj. sian 25 jaran pastran jubileon. Ni korege gratulas al lia pastra moŝto, kiu enkondukis E.-on en sia lernejo, prelegas E.-on en la teologia fakultato en Salzburg, estis dum multaj jaroj unu el la gvidantoj de la aŭstria movado kaj nuna vicprezidanto de Aŭstria Esperanto - Asocio. Ni esperas, ke ni havos la okazon en 25 jaroj denove gratuli lin.

La Salzburg-a E.-Klubo, kies longjara vicprezidanto d-ro Christanell estas, festis la 9. jan. en ĉeesto de preskaŭ ĉiuj klubanoj en sia belege per floroj kaj la bildo de nia Majstro ornamita klubejo ĉi tiun jubileon, por danki kaj honorigi sian meritplenan pioniron. Prof. Scheierl en tre bela, bonega, parolado profundkora menciis la grandajn meritojn de la jubileanto. La klubmuzikistaro plibeligis ankaŭ ĉi tiun feston.

Lia pastra moŝto Wolfgang Nedwid, prioro de l'abatejo de la Skotaj Monaĥoj en Wien, suferis grandan perdon per la morto de sia amata patrino. Ni elkore kondolencas al nia altŝatata samideano!

*

Prüfungen für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto.

Die Prüfungen beginnen am 3. April 1929 um 8 Uhr früh mit der schriftlichen Prüfung im Gebäude der Bundeslehrerinnenbildungsanstalt in Wien, I., Hegelgasse 14. Die Zeit der praktischen und mündlichen Prüfung wird den Prüfungswerbern einzeln bekanntgegeben. Die nach § 4 der Prüfungsvorschrift belegten und mit einem 1 Schilling-Stempel versehenen Gesuche um Zulassung zu den Prüfungen sind bis längstens 20. März 1929 bei der Direktion der Prüfungskommission in Wien, I., Burgring 9 (Stadtschulrat), Zimmer 53, einzubringen. Die Prüfungsgebühr von 20 Schilling bezw. 10 Schilling ist vor Beginn der schriftlichen Prüfung im Prüfungsraume zu erlegen.

Graz: E.-Soc. por Stirio vigle laboras, sed pro oficŝanĝo de s-ro Rogler multa laboro postrestis. Raporto ne ankoraŭ alvenis. La grupo aliĝis al AEA.

Graz: E.-grupo »E. Peltier« restos ekster la organizo, nek restas ĉe AED, nek nun aliĝas al AEA.

Hallein: Vigle laboras la grupo, kies prez. estas s-ro Dornouer, sekr. f-ino Hochrainer. Kurson gvidas nia malnova pioniro prof. Mathiaschek. Aliĝis al AEA.

Innsbruck: La grupo restos ĝis la ĝeneralkunsido ĉe AED kaj nur tiam decidos pri aniĝo al AEA.

Korneuburg: Aliĝis al AEA.

Krems: La grupo nek aniĝos al AED nek al AEA, sed atendos.

Linz: Ĝeneralkunsido de Supra Aŭstria E.-Soc. (SAES) kaj de ĝia subgrupo Linz okazis la 8. II. Decidoj: Aliĝo al AEA. Ĉiuj esp.-istoj en Supra-Aŭstrio kaj Linz aliĝu al SAES resp. la Linz-a grupo por helpi unue al la movado en Supra-Aŭstrio. Membroj de SAES ankaŭ estas membroj de AEA. Same ĉiuj lokaj grupoj de Supra-Aŭstrio aliĝu al SAES (kiel Linz kaj Steyr). Laborraporto: Dissendado de 3000 cirkuleroj pri E. al eminentuloj nialandaj. 3 kursoj en Linz, krome kelkaj en knabina lern-

ejo. Novelektoj: prez. - G. von Schmidt auf Altenstadt, vicprez.-direkt Wanneck, sekr.- R. Ulbrich, H. Bürger, kas.-J. Mraz, J. Faatz (Steyr), krome insp. Meisleder, H. Fantersitt. Kotizo por 1929 Linz Ŝ. 6·— abono al AE Ŝ. 4·—, familianoj Ŝ. 2.—, ekster Linz minimume Ŝ. 2·—. Por 1929 riĉa programo. Ĉiu kunhelpu.

Ried: E.-Klubo aranĝos la 9. marto amuzvesperon, aranĝota de la kursanoj de fakinstruisto Jungschaffer, prez. de la tiea Klubo.

Saalfelden: Senbrue sed senlace laboras la grupo sub la prez. de s-ro direktoro Wallinger. Aliĝis al AEA.

Salzburg: E.-grupo en sia ĝeneralkunveno en kelkaj tagoj decidos pri aniĝo al AEA. Laŭ raporto la estraro proponos la aliĝon al AEA.

Wels. Nedeviga E.-instruado en la duklasa komerca lernejo, 2 horojn semajne. Mi instruas uzante E.-interparolan kurson Linguaphone (30 murbildoj kun 30 gramafondiskoj). La sistemo estas tre simpla kaj natura. La diskojn parolis d-ro Privat. Prof. Paar-Wels.

I. E.-Unuiĝo en Wien en sia ĝeneralkunsido la 25. jan. elektis jenan estraron: Prez. — Steiner, vicpez. — d-ro Sós, majoro Sinner, sekr. — inĝ. Sinek, s-ino Wüster, kas. — ĉefadministr. Braun, konsil. — min.-kons. Hawlik, eldon. Hovorka, kalk.-kons. Siedl, fakinstr. Haager, s-ro Lackenbacher, fabr. Szekely, f-ino Kaes. La klubo ŝanĝis sian germanan nomon de »Verein« en »Klub« kaj aliĝas al AEA.

Katolika Unuiĝo E.-ista: En la ĝeneralkunveno la 27. jan. estas elektita jena estraro: P. Wolfg. Nedwid-prez., P. Fr. Kudrnowsky kaj s-ro Chiba-vicprez., dir. Schiebl-kas.

Teknik-akademia E.-Klubo: Decido: Aliĝi al AEA.

Virina E.-Sekcio: Aliĝis al AEA.

„Ĉu hodiaŭ vi restos sola la tutan vesperon?"

„Jes. Mia edzino iris por momento al la najbarino."

Korespondado:

PK. = poŝtk., Pl. = pk. il, L. = letero!
PM. = poŝtm, bfl. = PM. bildflanke.

Bahia Blanca (Argentino): Vicente Orlando, Str. Alsina 257, PM.

Las Martinas (Kubo, Prov. Pinar del Rio): Pastro Augustin Lopez, PM,

Osaka (Japanujo): Risuke Kataoka, 5, Gamo-ĉe, Higaŝinariku, Pl.

Rekomendindaj firmoj.

Korneuburg.

Bäckerei = bakejo:
Karl Luegmayer (E), Albrechtstraße 3.

Gemischtwaren = Diversajoj:
Alois Cisar, Bisambergstr. 21.

Kaltenleutgeben.

Peter Pich, komercisto, Hauptstraße 61.

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.- Verein für Steiermark, Geschäftsstelle (oficejo) Radetzkystr. 6/III, Vereinsheim (kunv.) »Pastete«, Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Leoben.

Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Mittwoch (me) 20—22 h.

Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Schottenhof (Akademikerheim) Mi (me) 17·30—19·30 h.

I. Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Annagasse 5, I-a et., klubejoj de »Politische Gesellschaft«, Fr. (v.) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV., Schüffergasse 3, Mi (me) de 19 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉ utage 17—19 h.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Cafe Elsahof, Mo (l) 19—23 h.

Esp.-societo »Fideleco«, Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16—19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Hugo Steiner, Bisamberg 248.
Presejo: Franz Reißmüller, Wien, I Johannesgasse 6